

RIVERO
ARBARO
HISTORIO



Beneluxsa Kongreso 2023

28 septembro - 1 oktobro

Bouillon (Belgio)

Kongreslibro

benelukso.eu/kongreso



Salutvorto de la prezidanto de V.Esp-o



Nome de Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o) mi ĝojas bonvenigi vin al nia Beneluksa Kongreso en Bouillon. Kiel vi scias, la Beneluksa Kongreso (BNLK) estas alterne organizita de unu el la Esperanto-asocioj de Belgio. Pasintjare, ĝi okazis en Ipro (Flandrio). Post kiam ni dufoje organizis kongreson en Charleroi, ni volis montri al vi alian flankon de Valonio. Valonio estas ankaŭ konata pro ĝiaj naturo, arbaroj kaj kvietaj vivmaniero, kaj estas ĉi tiu aspekto de nia regiono, kiun ni volis montri al vi. Do, Bouillon.

de la regiono de La Semois: tabakfabriko. Proksime de Bouillon restas ununura aŭtentika fabrikisto de tabako kaj ni vizitos lin.

Se vi emas marŝi, ni organizos promenadojn en la naturo. Unu el ĝi estas iom dekliva sed ĝi disponigas superbajn vidojn de la regiono kaj de la urbo. Rezervita por bonaj promenantoj. Por la aliaj, restas la ebleco vidi la belajn lokojn aŭte.

Bouillon, kiel vi vidos estas agrabla urbo sude de Belgio. Ĝi estas ĉirkaŭita de belega naturo kaj la meandroj de la rivero 'La Semois'. Jes, ja, ĝi ne havas stacidomon, sed tio estas parto de la ĉarmo de la urbo. Ĝi estas iom izolita, kaj kiel por ĉio altvalora, indas fari iom da peno.

Krom prelegoj kaj kursoj (de Katalin Kováts ĉiuokaze!), ni havos la ŝancon malkovri Armel Amiot kiu koncertis dum la UK en Montrealo. Li kantas en Esperanto kaj akompanas sin per sia banĝo.

Evidente, la ĉefa vidindaĵo de Bouillon estas ĝia kastelo. En tiu fama fortika kastelo komenciĝis la unua krucmilito kun Godefroy de Bouillon. Mirinde, la kastelo ne estas tiom granda; por la endomaj ĉambroj, oni eĉ ne povas mendi grupan viziton. Tial ni tradukis por vi la gvidlibron kiun vi povos uzi dum la vizito.

Sabaton, ni havos la plezuron ĉeesti demonstron de pordopilko (*Gateball* en la angla). Se vi neniam antaŭe aŭdis pri ĉi tiu ludo, jen la okazo veni kaj konatiĝi kun ĝi, precipe ĉar la celo de la demonstro estas formi esperantistan teamon de pordopilko.

Kun ĉiuj membroj de la LKK, mi esperas, ke vi ĝuu la kongreson kiun mi deziras al vi tre agrabla kaj sukcesplena.

Jean Annet



© <https://openstreetmap.org/>

Redaktis ĉi tiun kongreslibron por vi Jean Annet kaj Yves Nevelsteen. Ĝin kompostis Yves Nevelsteen. Helpis pri la diversaj tekstoj interalie Valère Doumont, Catherine Royaux kaj Jean-Pol Sparenberg. Koran dankon al Nikolao de Buyl pro la korektado kaj plibonigo de la teksto pri la kastelo. © Valona Esperanto-asocio 2023

Praktike

Bazaj informoj

Route du Christ, 16
BE-6830 Bouillon
+32 (0)61 46 81 37

Salonoj

Estas pluraj salonoj kie okazos la agadoj.

- plurcela ĉambro (*salle polyvalente*): libroservo, kursoj de Katalin Kováts kaj koncerto
- malgrandaj salonoj unu etaĝo sube: paŭzoj, atelieroj
- salono en aparta gastejo (*gîte*): Prelegoj, ĝeneralaj asembleoj de BEF, EEU kaj Verdaj Skoltoj

Manĝoj

La horoj de la manĝoj estas :

- matenmanĝo: je la 8h30
- tagmanĝo: 12h30
- vespermanĝo: 18h30

Vifio

En la junulargastejo mem kaj en la salono en la aparta gastejo estas rapida retaliro per vifio. La kodon vi trovos ĉe la enirejo.

Fotoj

Ni kreis komunan fotaron. Vi povas alŝuti al ĝi ankaŭ viajn fotojn!

mallonge.net/fotaro-BNLK2023

Kontaktoj de la LKK

- Jean Annet: +32 495 10 32 30
- Valère Doumont: +32 485 51 75 52
- Yves Nevelsteen +32 472 106 086
- Catherine Royaux +32 487 96 11 52
- Jean-Pol Sparenberg: +32 475 27 23 19

Dankon pro via partopreno en nia kongreso!



© Les auberges de jeunesse Belgique

Programo

ĴAŬDO 28 SEPTEMBRO

10:00	akceptejo malfermita
10:30	unua taksiservo ĉe la stacidomo Libramont (se iu mendis ĝin)
11:30	dua taksiservo ĉe la stacidomo Libramont (se iu mendis ĝin)
12:30	ekiro al Corbion por tagmanĝi en la restoracio 'Hôtel des Ardennes'. Temas pri tagmanĝo kun 3 pladoj (komenca plado, ĉefa plado, deserto) kaj unu trinkaĵo. Rue de la Hate, 1 - 6838 CORBION
14:00	vizito de la muzeo de la tabako. Luda kaj maltipa vizito al metiejo-muzeo, tra malnova komerco: la transformo de la tabako 'la Semois' en multoblaj etapo, al la ritmo de maŝinoj datiĝantaj de 1900 en funkciado. Vi vidos la metiiston laboranta, kaj ankaŭ amason da objektoj, kiuj rilatas la vojaĝon de tabako tra la jarcentoj, kulturoj, kaj kutimoj. La viziton kompletigas video ilustranta la laboron de tabako de la semo ĝis la pipo. Rue du Tambour, 10 - 6838 CORBION
16:00	vizito de la domo de Mateo, projekto kaj gvidado de Alex Humet Rue Jean-Baptiste, 12 - 6838 CORBION (detaloj en paĝo 30)
18:30	vespermanĝo en la junulargastejo en Bouillon
20:00	interkona vespero: <ol style="list-style-type: none"> 1. biergustumado 2. renkontiĝo kaj memoroj de la partoprenintoj de la Universala Kongreso en Torino 3. Riskoludo fare de Katalin Kováts

© Musée du Tabac



Programo

VENDREDO 29 SEPTEMBRO

08:30	matenmanĝo
09:30	<ol style="list-style-type: none"> kurso kun Katalin Kováts promenado kun Catherine Royaux (Katerin) prelego de Ben Indestege pri laboregimoj historie, nuntempe kaj estonte. Loko: aparta gastejo. la fortoj kaj malfortoj de la tri Esperantaj belgaj asocioj por la estonteco. Debato/diskuto/renkontiĝo kunordigita de Eric Nemes (Eriko) kunveno de uzantoj de Eventa Servo kun Yves Nevelsteen. libroservo
12:30	tagmanĝo
13:50	vizito de la arkeoskopo. Vidu la tekston en paĝo 9.
15:30	<p>spektaklo de rabobirdoj en la kastelo</p> 
16:00	vizito de la kastelo de Bouillon. Vidu la ekskursgvidilon en paĝo 14.
18:30	vespermanĝo en la junulargastejo
20:15	nokta spektaklo en la kastelo: <i>L'Odyssée de lumière</i> (La odiseado de lumo)

Programo

SABATO 30 SEPTEMBRO

Tutan tagon:

- libera vizito al la *Musée Ducal* (Duka Muzeo). Vidu p. 13.
- libroservo

08:30	matenmanĝo
09:30	<ol style="list-style-type: none"> kurso kun Katalin Kováts ĝenerala membrokunveno de la Belga Esperanto-Federacio makrameo fare de An Olijslagers. prelego de Eduard Kusters: Limoj en la evoluo. Loko: aparta gastejo. Seán Ó Riain prezentas sian libron.
12:30	tagmanĝo
14:00	<ol style="list-style-type: none"> prezento de Pordopilko (<i>Gateball</i>), teama sporto simila al kroketo. Ĝi estas precipe konsiderata sporto por junuloj, sed taŭgas tamen por ĉiuj aĝoj. Vidi plian prezenton en paĝo 28. promenado kun Catherine Royaux (Katerin). Atentu: ĉi tiu promenado estas por bonaj promenantoj! Kunportu bonajn ŝuojn. Por aliaj, kiuj volas promeni, ni organizos aŭtoveturadon kun pli alirebla promenado.
16:30	<ol style="list-style-type: none"> kantaliere kun Armél Amiot, la koncertisto. Loko: plurcela ĉambro. ĝenerala membrokunveno de EEU (kun Seán Ó Riain, prezidanto de EEU, kaj Flory Witdoeck). Loko: aparta gastejo.
18:30	vespermanĝo en la junulargastejo
20:00	prelego de Paul de Cooman : "Per tramo al Bouillon". Historio de la komuna transporto en la regiono. Loko: aparta gastejo.
21:00	koncerto de Armél Amiot . Loko: plurcela ĉambro.

Programo

DIMANĈO 1 OKTOBRO

08:30	matenmanĝo
09:30	<ol style="list-style-type: none">1. kurso kun Katalin Kováts2. ĝenerala membrokunveno de la Verdaj Skoltoj3. ŝtofkolorado fare de Nicky Janssen4. prelego de Frank van Hertrooij pri la historio de astronomio. Frank estas 24-jaraĝa esperantisto el Nederlando. Li lernis Esperanton kiel infano kaj nun uzas la lingvon por iri al Esperanto-aranĝoj kaj paroli kun amikoj. Li ankaŭ ŝatas komuniki sciencajn temojn per prelegoj kaj sia blogo (Scivolemo). Ekster Esperantujo Frank studis ĥemian teĥnologion kaj nun plustudas por iĝi mezlerneja instruisto. Aldone, li volontulas en astronomia observatorio. En sia libera tempo li ŝatas legi kaj fari muzikon, aŭ amuziĝi kun siaj amikoj kaj samdomanoj.5. krom-ekskurso: vizito de la “Ardoisières de Bertrix”. Unuhora subtera turneo. Surpriza vojaĝo... Malsupreniru 25 metrojn, per komforta ŝtuparo kaj malkovru, tra itinero de preskaŭ 1 km, la geologion de ardezargiloŝtono, eltiroteknikojn kaj la laborkondiĉojn de ministoj. Krompago: 15 €.
12:30	tagmanĝo
14:30	fermo de la kongreso
14:00	postkongresa ekskurso (ne organizita): vizito de la arkivoj de la Internacia Esperanto-Arkivo , Arnoudt Rulenslaan 10, 3020 Winksele (apud Leuven). Eble jen unika okazo por fojon vere surloke viziti la kolekton al kiu vi ankaŭ kontribuis/as/os? iespa.eu

La arkeoskopo • la spektaklo

Ni estas en 1060. La generacio kiu konis la 10-an jarcenton estingiĝis.

Ekde tiam du mondoj kontraŭis, la idealoj konkuras. La Okcidento estas okupita de feŭdismo kaj la Romia Eklezio pli okupita de politiko ol dediĉita al sindonemo.

La Oriento estas aroganta kaj Islamo, konkerema. La glavo, la kruco, la kreska lunarko havas forton de juro.

Antaŭ la fino de la jarcento, la standardoj maskos la kolorojn de la ĉielo. En tiu milita kaj grandfervora klimato aperas la politika mapo de du mondoj: Oriento minacita de Islamo, Okcidento disŝirita inter Romia Eklezio kaj Germana Imperio. Ide d'Ardenne, edzino de grafo Eustache de Boulogne, naskas sian duan filon, kiun ŝi baptos de la persona nomo de sia onklo, Godefroy.


Tiu fariĝos la fama venkinto de la unua krucmilito, la kristana konkeranto de Jerusalemo, la viva simbolo de kavaliereco en la Alta Mezepoko.

Antaŭ ol entrepreni tiun verŝajne plej gravan “militistan pilgrimadon”, li loĝis en Bouillon, en sia kastelo.

Tiutempe du potencoj kungluiĝas: tiu de la Eklezio de Romo kaj tiu de unu heredanto de Charlemagne, Henri, reĝo de Germanio.

Ekskomunikita, Henri ĉirkaŭas sin per assembleoj de fideluloj. Unu el tiuj, Godefroy nomata “la ĝibulo”, frato de Ide kaj onklo de Godefroy de Bouillon, furioze rezistas al la premoj de la Eklezio. Tamen, lia edzino, grafino Mathilde de Toskanio estas la plej bona amikino

© Maison du Tourisme du Pays de Bouillon en Ardenne



de la Papo.

Tiu politika malamikeco dividas la paron: estas la glavo kontraŭ la kruco. La ĝibulo, la ĉikanita duko de Malalta Lotaringio, markizo de Antverpeno, grafo de Verdun nomigas Godefroy de Bouillon, sia heredanto. Oni diras, ke li petis sian nevon meti sian glavon al la servo de la Eklezio por elaĉeti la krimojn de sia onklo kaj liaj praaĵoj. Nokte, la 26an de februaro 1076, vizitante siajn nordajn terenojn, li estas murdita.

La junulo Godefroy, konvinkita, ke ĝi estas krimo nutrata de Mathilde de Toskanio, kaj pro la hereda promeso de la forpasinto, akiras la markizon de Antverpeno, la graflandon de Verdun kaj ekloĝis en Bouillon. La Duklando de Lotaringio estos konfidita al li de la reĝo dek unu jaroj pli poste. Ĝiaj teritorioj estas vastaj. Lotaringio estas feŭdo, kiu etendiĝas de Skeldo ĝis Rejno.

Tre rapide, la posedaĵoj de Godefroy estas aviditaj de Mathilde kaj la aliancanoj de la Papo kiuj sendas, por sieĝi la kastelon de Bouillon (sub la kompleza okulo de la reĝo de Germanio), la grafon de Namuro, komandanto de la plej potenca armeo iam ajn vidita en la Ardenoj.

Godefroy kaj ĝia kastelo tenas. La rezulto de la konflikto estas decidita dum juĝo de Dio, ia turniro, kies gajninto estas agnoskita de ĉiuj, pastrara kaj laika. Per unu mano,

la rompita glavo, G. de Bouillon venkas la Grafon de Namuro. Nun, la sinjoro de Bouillon estos obeata kaj respektata.

Godefroy tiam plifortigas la strategian pozicion de sia kastelo, kiu estis tiam simpla ĉefturo el ŝtonoj ĉirkaŭita de lignaj palisadoj, regante la malgrandan vilaĝon Bouillon kaj la fortikan muelejon apud rivero *La Semois*. Godefroy entreprenas la konstruadon de gvatado stacioj, de pasejoj kaj li armas fortan militistan gardantaron. Ĉi tiu malgranda ĉefturo ĉirkaŭita de palisadoj tiam fariĝas fortikaĵo nevenkebla kaj elpensita por rezisti la plej fortajn atakojn.

Krom la konstruaĵoj de la grandaj kaj malaltaj kortoj, ĝia rolo estas gastigi la moŝtan familion kaj lian gardiston. La ĉefturo ankaŭ enhavas la kapelon alireblan nur ekde la domo sed ankaŭ la provizejojn kaj grenejojn plenplenajn de proviantoj, ne nur por la kastelanoj, sed por la vilaĝanoj kiuj venis rifuĝi dum sturmoj. La cisterno, kiu ankoraŭ ekzistas, estas por la homoj kaj bestoj. Oni opinias ke ĝi estas neelĉerpebla dum jarcentoj. Vizitante la kastelon, ni sentas, malgraŭ la aldonoj de la diversaj arkitektoj dum la jarcentoj, ĉi tiun klimaton de sekureco dank' al la trankvileco de la loko kaj ĝia strategia pozicio super la meandroj de la rivero *La Semois*.

Dum la vintro 1095, monaĥo

vojaĝas tra la kamparo. Revenante el Jerusalemo, kie li estus vidinta la militistojn de Islamo persekuti la kristanan minoritaton ĉirkaŭ la Eklezio de Sankta-Sepulkro. Pierre la Ermito riproĉas la baronojn ilian senfarecon kaj iliajn fratmurdatajn luktojn. Li predikas la krucmiliton.

Samtempe, la bizanca imperiestro, Alexis Comnene, alarmita de la ortodoksa pastraro, provas bremsi la islaman invadon sur sia lando de Azio. Urban II la nova papo, sentema je ĉi tiu helpoalvoko, instigas la okcidentan mondon al armita pilgrimado por liberigi la tombon de Kristo : en novembro de la jaro 1095, en la Katedralo de Clermont, antaŭ multaj episkopoj kaj sinjoroj, Urban II ekigas unu el la unuaj sanktaj militoj de la kristana Historio.

En sia prediko li deklaras, ke la turkoj kaj la araboj atakis la kristanajn fratojn el Oriento kaj elfaras masakrojn kaj rabadojn. Li instigas riĉulojn kaj malriĉulojn ĉasi el la kristanaj teroj la paganojn kiuj insultas Dion. Li garantias kompletan absolvon al ĉiuj, kiuj mortos dum la krucmilito kaj li estas la unua kiu lanĉos la faman krion "Dio volas ĝin". Krome, li promesas ke la Eklezio protektos dum sia foresto la posedaĵojn de la krucistoj. Viktimo de la maljustecoj de lia reĝo Henri de Germanio kaj de la atakoj de la Eklezio de Romo, Godefroy vidas en ĉi tiu alvoko la okazon

realigi la deziron de sia onklo: meti sian glavon al la servo de trafa kaŭzo kiu ankaŭ forsolvos siajn problemojn kun la du potencoj.

Por financi sian armeon, li vendas sian tutan havaĵon, inkluzive la kastelon de Bouillon kiun li cedas al la Princo-Episkopo de Lieĝo por la preciza sumo de 1300 marko da arĝento. Grandega sumo! La 15-an de aŭgusto 1096, sekvante senpacienca trupon de almozuloj gvidataj de Pierre la Ermito, Godefroy de Bouillon, ĝiaj vasaloj kaj ilia armeo taksita je mil rajdistoj kaj sep mil infanteriistoj, ekiras al la Sankta Milito. Tagon post tago, miloj da pilgrimantoj kaj soldatoj foriras el Italio, Flandrio, Normandio, Gaskonio, Provenco. En Bouillon, ĉirkaŭita de siaj lojalaj amikoj, Godefroy lanĉos (post la Papo) la militkrion, kiu resonados dum du jarcentoj "Dio volas ĝin".

La longa piedirado, la granda transirejo de orienta Eŭropo, komenciĝas. Infanteriistoj, rajdistoj, ĉaroj ŝarĝitaj per provizoj, pezaj tolaj tendoj, fero kaj bronza armiloj, kaj multaj brustoj plenigitaj per oraj kaj arĝentaj varoj (utilaj por estontaj transakcioj), penadas antaŭeniri. Godefroy venkas mal-facilaĵojn krom tiuj de provizoj kaj resto de siaj trupoj, La kunuloj de Petro la Ermito, kiuj antaŭas ilin, ne havas la skrupulojn de la kavaliroj.

Privateco kondukis ilin fari multajn

rabadojn kaj krimojn inkluzive de la unuaj judaj pogromoj en la kristana okcidento.

En Hungario Godefroy liveras sian propran fraton Baudouin kiel garantiulo por akiri pasrajton kaj garantii al reĝo Columan la sekurecon de liaj samlandanoj. Li ricevos sian liberigon post transiri la landon sukcese. En Bulgario, armeaj misuzoj de Petro la ermito farigis la regionon dezerto fajra kaj la sango de la loĝantoj tinkturis riverojn ruĝaj.

Cent tridek tagojn poste, la Armeo de Godefroy atingis Konstantinopolon. Bezonatas pluraj tagoj por kunigi la aliajn aliancitajn armeojn. Filino de la imperiestro Alexis, la bela erudicia Ann, de kiu ni trovis skribaĵojn, timas la danĝeran agresemon de tiuj krucistoj, kiuj tendumas ĉirkaŭ la ĉefurbo de la Imperio.

Por transiri la Bosforon kaj dokon en Malgranda Azio, la krucmilitistoj devis akiri de la Imperiestro ŝipojn kaj manĝaĵojn. Godefroy intertraktis kun la monarko, sed konsciis ke la krucistoj estis viktimoj de marĉandado.

Kompense, la Imperiestro postulas la donacon de ĉiuj landoj de la Proksima Oriento konkeritaj de la krucistoj. Ĉiuj gvidantoj de Okcidenta Armeo ne volis submetiĝi al ĉi tiu pakto. Ili sentas sin perfiditaj. Nordaj kavaliroj volis trovi sub la suno kion ili perdis en siaj humidaj

arbaroj. Godefroy tamen persistis konservi la komencan celon. Nepras atingi Jerusalemon!

Krucistoj ne suspektis la egecon de la venontaj bataloj, ne nur kontraŭ

Turkoj kaj Arabaj kun malpezaj armeoj kaj rapidaj ĉevaloj, sed ankaŭ kontraŭ soifo, malsato, plago, sovaĝaj bestoj, malsanoj, terura varmego, malvarmo de la glaciaj montoj, aldone tiuj mirigaj urboj, tiuj fortikaĵoj el ŝtono, tiuj sennombraj armeoj en Malgranda Azio.

Niĉée, islama citadelo kun siaj ducent kvardek turoj, Dorylée kie Godefroy venos tutlastmomente forsavi la krucistojn de Italio, Iconium, Césarée, la ok monatoj de Antioŝa blokado, tiom da konkeritaj lokoj, post senfinaj blokado, malkuraĝigoj, homaj perdoj.

Je la 7-a de junio 1099, pli ol mil tagoj post la foriro el Bouillon, Godefroy kaj ĝiaj aliancanoj atingis Jerusalemon, la sankta Urbo.

La 15-an de julio, li metis piedon sur la gigantaj muroj dank'al grandega ligna turo konstruita ene de nokto. De tiam la sturmo estis ĝenerala, ĉiuj okcidentaj armeoj devigis la Egiptan Garnizonon cedi. La krucistoj eniris po centoj en la mallarĝaj stratoj de la urbo Salomono. Masakro! Sango fluis tra la stratoj al la makzeloj de la ĉevaloj.

Vespere la 17-an de julio, la krucistoj falis sur la genuoj antaŭ la tombo de Kristo, en la preĝejo de

Sankta Sepulkro. Kvin tagojn poste, Godefroy de Bouillon estas elektita kiel reĝo de Jerusalemo. Li rifuzas la titolon sed akceptas la taskojn. Onidire li deklaris: "Kiel mi audacus porti oran kronon dum la Reĝo de Reĝoj, Jesuo-Kristo, la Filo de Dio, portis kronon de dornoj en la tago de sia pasio?"

Unu vesperon, revenante de Acre kaj Jaffa, Godefroy malsaniĝis, li spiregis, lia pulso estis neregula. Febro maligna invadis siajn

membrojn. Ĉu li manĝis venenigitan frukton ofertita de la emiro de Césarée? Aŭ ĉu li suferis misteran malbonon kontraktitan en Bouillon aŭ dum la krucmilito? Ni neniam scios. Lia promeso estis plenumita, lia glavo pendis sur la muro de la Eklezio de la Sankta Sepulkro. li "povas" morti... Estis la 18-a de julio 1100. Lia frato Baudouin fariĝis, kelkajn monatojn poste, je la Kristnaska Tago la unua franca reĝo de Jerusalemo.

La Duka Muzeo • vizito sen ĉiĉerono

Rue du Petit, 1-3 Bouillon. Malfermita de 10h ĝis 18h.

Sub la kastelo, ĉi tiu muzeo etendiĝas super du historiaj domoj kaj inkluzivas malnovan

forĝejon. Ekspozicioj elstarigas la vivon de Godefroy de Bouillon, la Unuan Krucmiliton, la lokan metalindustrion kaj lokan artiston Albert Raty (1889-1970).



HISTORIA AVIZO

Bouillon [EO: “Buljono”] jam estas menciita en skribaĵoj antaŭ la jaro 1000. La plej bonaj fakuloj konsentas, ke tiu ĉi nomo datiĝas de la gaŭloromia periodo. Sed, pro manko de konvinkaj dokumentoj, neblas certigi precizan daton de la fondiĝo de ĝia kastelo. La historia funkcio de la Kastelo de Bouillon estos gardi la trairejon inter la nordo kaj la sudo, inter Alta kaj Malalta Lotaringio; tiuj famaj “avenuoj de la francoj” uzitaj de ĉiuj invadoj ĝis 1940.

La historio de la kastelo strikte sekvas tiun de la Urbo kaj la Dukejo de Malalta Lotaringio; ĝi havas tri apartajn periodojn:

1. La **Dukoj de la nobela Familio de Ardenoj** estis la posedantoj ĝis 1096. De tiu familio Godefroy de Bouillon estis la kvina kaj lasta de la nomo. Estis en tiu periodo ke Godefroy de Bouillon garantidonis (kun la ebleco de elaĉeto de sia posedaĵo ene de tri jaroj) sian tutan duklandon al Otbert, Princo-Episkopo de Lieĝo. Otbert prirabis la preĝejojn kaj monaĥejojn de sia propra diocezo por pagi la prezon. Tiel kontribuante al la elspezoj de la unua krucmilito, la duko konkeris Jerusalemon kaj tie mortis en

1100 kun la titolo de “Defendanto Protektanto de la Sankta Tombo” post rifuzado porti la oran kronon de Reĝo de Jerusalemo “kie Kristo portis dornan kronon”.

2. La **Princo-Episkopoj de Lieĝo**, dua serio de la Dukoj de Bouillon konservis ĝin dum preskaŭ ses jarcentoj.
3. La Princo-Episkopoj de Lieĝo fine perdis la titolon de Duko ĉar la **familio de La Marck** sukcesos senrajte proprigi al si la titolon. La Princo-Episkopoj, pro konvenaj kialoj, delegis siajn povojn al guberniestroj kaj, en 1430, nomumis guberniestron unu el la grandaj feŭdaj gravuloj de la princlando, grafo Evrard III de La Marck. Tiu ĉi familio havis eksplodeman temperamenton, estis ambicia kaj, ĉefe, sen multe da skrupuloj. La familio eĉ sukcesis, komence de la 16-a jarcento, akiri la titolon de Duko de Bouillon samtempe kun la Princo-Episkopo de Lieĝo. En 1591, Henri de la Tour d'Auvergne, geedziĝis kun Charlotte de La Marck, kiu mortis seninfana sed testamentis al li ŝiajn posedaĵojn kaj titolojn. Jen kiel, sen posedi la kastelon, la de La Tour d'Auvergne portas la

titolon de Duko de Bouillon. Same malkvietaj kiel la de La Marcks, ili sukcesis transdonigi al si, en 1678, la urbon kaj la duklandon fare de la franca reĝo Ludoviko la 14-a, kies trupoj konkeris tiun regionon en 1676; tiu ekposedo estas oficiale konfirmita per la traktatoj de Nimego (1676) kaj Rijswyck (1697). Dum la tuta 18-a jarcento, Bouillon estos komparebla al oazo de libereco ĝis la 24-a de aprilo 1794, kiam la asembleo de la popolo de la duklando - kiu havas ĉirkaŭ 150 vilaĝojn - proklamis la respublikan reĝimon. En oktobro 1795 Bouillon iĝis parto de la Franca Respubliko (departemento de la Arbaroj).

Post la malvenko (1815) de la Franca imperiestro Napoleono la Unua en Waterloo, la dua Traktato de Parizo (20-a de novembro 1815) reunuigis la iaman suverenan teron de Bouillon kun Nederlando. Kaj en 1830, dum la belga revolucio, la duklando definitive estis entenita en Belgio.

La feŭda kastelo estis difinita jene: grupo de konstruaĵoj alte starigitaj kiel kompleto kiuj izole sin defendis kvankam kunigitaj de komuna defenda penso. Ĉi tiu formulo ŝajnas esti verkita speciale por nia kastelo; ĝi ilustras ĝin perfekte. Ekzistas ankaŭ granda principo de milita arkitekturo, laŭ kiu ĉiu

defendelemento devas esti defendita de tiu, kiu ĝin sekvas, kies aplikado estas rimarkinda: la informita vizitanto povas tion rimarki tuj kiam tiu eniras la kastelon. Ne eblas ne esti imponita de la granda nombro de embrazuroj kaj paftruoj kiuj, aranĝitaj ventumilforme, tiel formas teruran amfiteatron de pafado kiu devis malinstigi ajnan alproksimiĝon ...

La apero de artilerio profunde ŝanĝis la feŭdan aspekton de la kastelo kaj ĝian adaptiĝon al tiu ĉi nova armilo, same kiel la diversaj transformoj faritaj de Vauban, la arma arkitekto de Ludoviko la 14-a, kaj la konstrulaboroj dum la nederlanda periodo, kontribuis doni al ĝi la nunan aspekton. Tamen ĝi konservas multajn interesajn restaĵojn de primitivaj defendoj en sia infrastrukturo. Prave nia kastelo estas konsiderata de fakuloj kiel la plej rimarkinda kaj plej bone konservita specimeno en Belgio.

PRISKRIBA NOTO

1. Aldone al la kanonoj, la **aliro al la fortikaĵo** mem estis defendita per tri rompoj elhakitaj en la rokon kaj kovritaj de ponto: la unua estis **baskulponto** kun movebla pontoplanko kiu poste, en 1716, estis ŝtone rekonstruita; la aliaj estis

- 1 Baskulponto kaj levponto
- 2 Herso
- 3 Gardejo nederlanda
- 4 Trifoje levponto, fosaĵo kaj ŝtuparo Vauban

- 5 Primitiva ĉambro
- 6 Puto
- 7 Ligna rado de la puto
- 8 Honora korto
- 9 Sonorilo de la kapelo Sankta Johano

- 10 Paftruoj tridirektaj
- 11 Rundovojo
- 12 Flanka turo
- 13 Brakseĝo de Godefroy de Bouillon
- 14 Turo de Aŭstrio


- 15 Gardejo de la artilerianoj
- 16 Gvatotureto/Korbelita sentinelbudo
- 17 Maŝikulioj
- 18 Ventola kamentubo
- 19 Ogivaj volboj

- 20 Ŝirmita kamero
- 21 Pafilŝarga niĉo
- 22 Tortura ĉambro
- 23 Forgesejo
- 24 Malliberejo

- 25 Malgranda bastiono
- 26 Ŝtuparo de la muelejo
- 27 Enirejo de la kelo
- 28 Nederlandaj kelkarceroj
- 29 Salono Godefroy

- 30 Ekspozicio "Scriptura"

- A Gravurita frontispico
- B Ŝtuparo Vauban
- C Loko de la ĉefturo
- D Loĝejo de la majoro
- E Arsenalo
- F Honora ŝtuparo
- G Granda pulvejo
- H Malgranda pulvejo
- I Horloĝturo
- J Korno de Turenne



simplaj levpontoj. Ĉi tie, la gardisto komisiita por aktivigi la mekanismon gardas la enirejon.

La dua ponto, sur kiu ni troviĝas, estas admirinda pro ĝia aŭdaco kaj ĝia bela dezajno.

Sur la frontispico de la frontpordo, Godefroy-Maurice de La Tour d'Auvergne, Duko de Bouillon, gravurigis en ŝtono tiun “eternan monumenton de dankemo”, dediĉita al Louis XIV pro ties certigo al li pri la posedo de tiu Kastelo (1684).

2. Tiu ĉi koridoro estis tute fermita per la fera **herso**, kiu malleviĝis de la volbo glitante en la larĝaj ŝovsulkoj aranĝitaj en ĉiu muro. La obstrukco estis kompletigita per grandegaj trabegoj, kies finoj lokiĝis en la kavoj fositaj en la rokon de loko al loko.

3. Gardejo devenanta de la nederlanda periodo (ĉirkaŭ 1820). Proksime de la pordo staras impona muelŝtono de antikva manmuelejo kiu nutris grandan fornon (disfaligita en 1825) kie ĝis 2500 porcioj povis esti kuiritaj tage.

4. Tria levoponto. Ĝi estis ŝtone rekonstruita en 1686; la ĉirkaŭfosaĵo, malsupre, estis plenigita per akvo per akvokonduktiloj regitaj deinterne. Jen maldekstre la ŝtuparo (atribuita

al) Vauban, kiun ni uzos. Absolute rimarkinda pro sia pureco de linioj (ni estas en fortikaĵo, tion ni ne forgesu) kaj ĉefe pro tio, ke ĝiaj aroj da ŝtupoj artikigitaj sur duobla volbo estas kunmetitaj el ŝtonoj tiel bone tajlitaj kaj alĝustigitaj, ke ili tute ne bezonis morteron aŭ alian juntaĵon. Ĝi kondukas al la dua baterio, al la “Loĝejo de la Majoro”, komandanto de la loko, kaj al la primitiva ĉambro.

5. Primitiva ĉambro: unu el la plej malnovaj (12-a jarcento) kaj plej karakterizaj (nekredebla dikeco de la muroj). Ĝia misio estis defendi la alirojn al la 3-a levoponto same kiel la grandan puton (n-ro 6) profunde fosita en la rokon je 54 metroj. Vi povas vidi la blazonŝildetojn de la aliaj posedintoj kaj posedantoj de ĉi tiu kastelo. De maldekstre dekstren: la Princlando de Lieĝo, poste de La Marck, princoj de Sedan, de La Tour d'Auvergne tiam Guillaume 1-a, reĝo de Holando. Ili estas flankumitaj de la Leono de Belgio kaj blazono de Bouillon.

6. La puto. Tute fosita en la rokon, ankoraŭ profunda je ĉirkaŭ 54 metroj, ĝi estis uzata por provizi la kastelon per akvo. Ĉar akvo gravegis, oni ne forgesis pri ĝi okaze de la transformadoj de la kastelo kiujn efektivigis Marŝalo Vauban fine

de la 17-a jarcento: oni pliigis ĝian diametron ĝis 2,10 metroj kaj ĝia profundo ĝis la nivelo de la Semois (pli-malpli 65 metroj). Origine la puto estis izolita de tiu ĉi koridoro. La eĥo farita de ĉi tiu grandega cilindro estas sufiĉe impona.

7. Ligna rado. En ĉi tiu ĉambro, kiu komunikas rekte kun la puto, ankoraŭ estas la monumenta rado kun siaj 2 metroj de diametro je 1 de dikeco, ene de kiu ebligis al homoj lokiĝi kaj igi, per sistemo de padeloj, ĝin turni kiel vinĉo. La akvo aŭ manĝaĵo estis tiel alportitaj en ujoj ĉe la dezirata alteco.

8. La Honora Korto (nuna nomo de la iama “Place d'Armes”). Sur tiu ĉi loko iam staris la loĝejo de la sinjoro, “la duka palaco”. Ĝi estas la teatro de nia spektaklo: “Le Ballet des Rapaces” [EO: la baletoj de la rabobirdoj]. Sekcio de muro laŭ la “Ŝtuparo de Honoro” memorigas la ekziston de la malnova fortikaĵo (alta kvadrata turo kiu estis 30 metrojn alta) al kiu estis alkraciita la kapelo dediĉita al Sankta Johano, malkonstruita en 1824. Anstataŭ tiuj konstruaĵoj, la nederlandanoj konstruis kazematan kazernon nomitan “Caserne des Chevaliers” [EO: Kazerno de la Kavaliroj], disfaligita en 1905.

